

# KIO BREMSAS LA EVOLUON?

Ne konsiderante pli profunde la demandon ĉu la Esperanto-movado en Pollando aŭ - pli ĝenerale - en la mondo travivas krizon, en ĉi-tiu artikolo mi deziras prezenti mian propran opinion pri la faktoroj, kiuj laŭ mi bremsas la evoluon de la movado.

Por doni al miaj konsideroj ian raciigon, iun komparebenon, mi devas unue prezenti laŭeble koheran opinion pri la vojo, kiun la Esperanto-movado ĝis nun pasigis kaj pri tiu, kiu ankoraŭ restas antaŭ ni. Helpus ankaŭ almenaŭ elementoj de la diagnozo de nuna stato de la movado. Sur la fono de baldaŭ centjara tradicio estos des pli facile kompreni la kialojn de la stagnado.

La du sojloj

La Esperanto-movado en longdaŭra perspektivo tucerte ne estas movado, kiu tendencas konservi senŝanĝan staton de sia interesiĝo. Ĝi ne estas konservema movado, sed tute kontraŭe - la vizio ŝanĝi la sociajn rilatojn en la lingva komunikado sur internacia nivelo premas al ekspansiismo. Kaj ekspansio signifas evoluon, dinamismon, pligrandigon de la laborefikoj.

La strukturon de la internaciaj lingvaj rilatoj karakterizas tamen grandega inercio. La modifoj de tiu strukturo, do i.a. la fortorilatoj de la opaj lingvoj kaj la manieroj de la funkciado de la lingvaj kontaktoj etendiĝas je jardekoj. Tio ĉefe efikas el la malrapideco de la lingvaj procezoj, el la grado de la politikigi de la fenomenoj en la afero de lingvaj rilatoj kaj el la historie formita tradicio. La rolo de Esperanto en internaciaj lingvaj rilatoj estas (laŭkvante) proksima al nulo. Laŭkvalite la problemo aspektas alie, ĉar la perspektivo apliki projektitan lingvon estas ia tute nova alternativo en la ĝisnuna modelo de la lingvaj kontaktoj. Tiun alternativon apogas hodiaŭ neniu politika forto, rolanta sur la internacia scenejo, ne subtenas ĝin ankaŭ la historia tradicio. Kio rezultas el tiuj faktoj? Tio, ke ekzistas nenia grundo esperi dum la plej proksimaj jardekoj ian desupran enkondukon de Esperanto mondscale en la ekzistantan sistemon de lingvaj rilatoj. Mia opinio tiatipa decido povas iam ajn maturiĝi nur se estos atingita la t.n. "dua sojlo de la amasiĝo de Esperanto". La atingo de tiu sojlo okazas, kiam la kvanto de la desube formataj lingvaj kontaktoj pere de Esperanto kaj ties efikoj komencas ekvilibri la rolon de la faktoroj politikaj, historiaj kaj demografiaj, ĝis tiam havantaj la decidan signifon.

Alivorte: en difinita momento de la evoluo de la homaro funkcias konkreta modelo de lingvaj rilatoj. Ni diru, ke tia estas la modelo proksima al la aktuale funkcia, do bazita je plureco de naciaj lingvoj en internacia rolo. La opajn lingvojn kaj la modelojn favoras motivoj politikaj, historia tradicio kaj kono de lingvoj inter tiuj, kiuj senpere partoprenas la internaciajn kontaktojn. Kontraŭ la ekzistanta modelo argumentas i.a. motivoj ekonomiaj kaj la sento de lingvo egalrajteco. Tiuj lastaj faktoroj estas tamen ankoraŭ tro malfortaj por egaligi la rolon de la faktoroj politike-historie-demografiaj. Esperanto povas esti konsiderata nur tiam, kiam en la sistemo de la decidofaktoroj ĝi havos kelkajn esencajn atutojn, ekvilibrantajn ties mankojn. Politikan apogon por Esperanto mi pritaksas nereala. La historiaj motivoj apenaŭ povas esti konsiderataj, ĉar Esperanto estus sur tiu grundo tro freŝdata kandidato. Restas la ŝanco demografia, do la vasta kono de la lingvo enmonde (minimуме komparebla kun la hodiaŭa kono de la angla) kaj la duagrada atuto de la ekonomia,

demokratiiga aŭ eduka naturo. La demografia faktoro estas nenio alia ol aplikado de Esperanto en la komerco, turismo, kulturo, scienco, ekonomio ks. per instancoj kaj homoj, kiuj faras tion pro siaj sociaj roloj, profesie. Kiam tiu uzo de Esperanto radikigos, kiam ĝi estos vaste aplikata kiel unu el la internacie funkciantaj lingvoj far instancoj el ekster la Esperanto-movado, tiam ni povos konstati, ke la dua sojlo de la amasiĝo de Esperanto estas atingita.

La ekzisto de la dua sojlo supozigas, ke antaŭe devas esti trapasita la unua. Sub la “unua sojlo de la amasiĝo de Esperanto“ mi komprenas la situacion, en kiu la decidocentroj landaj (fakaj, kulturaj ktp.) komencos pli vaste propainiciate investi en Esperanton kiel en unu el la rimedoj realigi la lingvajn kontaktojn, nepraj por tiuj organismoj. Mi substrekas ĉi-tie la signifon de la *propra iniciato*. Per tio mi komprenas konscian, ne altruditan de la Esperanto-movado, aplikadon de Esperanto, kalkulantan je realaj profitoj en la realigo de propraj celoj. La trapaso de la unua sojlo estos do signata per rapida kresko de aŭtonomaj, reciproke nekunligitaj, teritorie kaj organize disigitaj decidoj investi en Esperanton.

Kiam la situacio maturiĝos al aŭtomata ekfunkcio de tiuspeca mekanismo? Tiam, kiam la publika opinio landa aŭ de la koncerna internacia organizaĵo estos konsciigita pri la senco kaj profitdono ekutiligi Esperanton por siaj celoj en la perspektivo mezurita per la periodo ne pli longa ol dekelkaj jaroj. Tiu konscio devas tamen esti apogita de la rimarkindaj pruvoj de praktika utileco de Esperanto kaj realeco atingi la esperantajn profitojn en la kazo decidiĝi je Esperanto kiel unu el la instrumentoj realigi la lingvajn kontaktojn de la instanco.

Kia diferenco ekzistas inter la unua kaj dua sojloj de la amasaĝo de Esperanto? LA UNUA SOJLO: La aktiveco de la Esperanto-movado estas tiel granda, ke en multaj institucioj kaj organizaĵoj neesperantistaj ekzistas “esperantaj organizounuoj“, establitaj dank’ al la movado. Tiuj unuoj kontribuas pere de Esperanto al la celrealigado de la koncerna institucio aŭ organizaĵo. La publika opinio konvinkiĝas, ke la utiligo de Esperanto estas tute normala kaj sencohava afero. Fone de tio neesperantistaj institucioj kaj organizaĵoj komencas proprainiciate turni sin, petante fakan helpon al la Esperanto-movado, por povi profiti de la lingvo por siaj bezonoj. La disvastigo de Esperanto komencas eskapi desub la kontrolo de Esperanto-organizaĵoj kaj de la Esperanto-movado en la hodiaŭa kompreno.

## LA DUA SOJLO

Esperanto jam delonge estas unu el la rimedoj de internaciaj kontaktoj de neesperantistaj organizaĵoj. Esperantistaj organizaĵoj plenumas al ili maksimume la servajn funkciojn (edukado de la instruistoj, kontrolo de la evoluo de la lingvo mem ktp.). La mondaj opinikreaĵoj estas plene konsciaj, ke Esperanto povas esti efika alternativo al la ĝisnuna modelo de la internaciaj lingvaj rilatoj. Tiuj opinikreaĵoj (ne la Esperanto-movado) postulas ĉiam pli laŭte la decidon enkonduki novan modelon, bazitan je Esperanto.

## Revolucia vizio

Kion mi prezentas ĉi-artikole estas kompreneble vizio de la revolucia vojo de la populariĝo (amasiĝo) de Esperanto. (Mi abstraktas de la ideo, ĉu tielgrada populariĝo de Esperanto entute iam okazos.) Ĉu pli revolucia vojo estas ebla? Kun iu probableco - jes. Sed mi ne konsilus kalkuli je “mirakloj“. Estos malpli da seniluziigoj kaj pli da efektiva laboro. Tiom pri la malpli proksima futuro.

## Pri nia pasinteco

Sed kiel aspektas nia pasinteco? Kion ni scias pri la vojo ĝis nun pasita per la “esperanta koncepto“ (pli precize, la koncepto apliki lingvon de arta genezo kiel vaste uzata rimedo en internacia komunikado)? Nu, ni ekzistas, la bebaĝan evolufazon ni postlasis ĉirkaŭ la jaro 1920, kiam formiĝis la komunumo parolanta Esperanton kaj travivis la malfacilan periodon de la unua mondmilito. Ekde tiu tempo ni fortikiĝis kiel komunumo. Ni formas siaspecan “biologian konservanton“ de la esperantismo. Ni kapablas kiel socio efike sin reprodukti en la monda kaj regionaj skaloj. Ni deziregas iri antaŭen, sed apenaŭ scias kiel. Ni provas diversajn traktojn, ni furiozas, sed marŝas sen ŝovi sin antaŭen. Kelkfoje ni provis agi, kvazaŭ ni jam atingus la duan aŭ almenaŭ la unuan sojlon. Nenio el tio efikas, sed ni konstante aspiras je “la fina venko“, kvazaŭ survoje ne ekzistus aliaj celoj, antaŭe atingendaj. Ni lernu el la historio. Ni jam atingis tiun fazon de nia evoluo, ke plej probable ne minacas al ni memlikvido. Krom tute sporadaj kazoj ni havas liberecon agi. Neniu nin rekte, administre persekutas, sed samtempe ni ne iluziiĝu, ke iu helpos nin aranĝi ion anstataŭ ni. Mi asertas, ke ĝis la komenco, kiam ni atingos la unuan sojlon, ni rajtas kalkuli nur je propraj fortoj, je propra inventemo. Post la trapaso de tiu sojlo la aferoj kuros aŭtomate. Sed antaŭ ol tio okazos, ĉio dependos nur de ni mem. Nian evoluon mi do vidas jene:

- la elformiĝo de Esperanta komunumo (socio) - ĝis 1920.
- la stabiliĝo de la socio - ĝis 1980.
- la epoko, kiu komenciĝas (epoko penetra) - ?
- la unua sojlo - ?
- la dua sojlo - ?
- la “fina venko“ - ?

## Tondiloj kaj bremsfaktoroj

Kiel mi akceptis supre, la kialojn de la manko de la sufiĉa premo antaŭen en la nuna stadio de la evoluo de la “Esperanto-koncepto“ mi vidas nur interne de la movado. (La sporadajn kazojn de la malpermeso evoluigi la movadon kaj de persekutoj tie aŭ aliloke en la mondo, kvankam dramajn, mi ne prenas en konsideron kiel ne influantan la tutan rezonadon.) Mi konscias, ke la Esperanto-movado baziĝas je la spirita sfero, ne la materia. La produkta aktivado en la esperanta socio apenaŭ ekzistas. Kio okazas en tiu sfero, havas pure instrumentan karakteron. Ekzemple la eldonado (ne redaktado) de revuoj kaj libroj. La produkta aktiveco de membroj de la esperanta socio okazas en ilia individua eksteresperanta aktivado. La kulturado de Esperanto (de la movado) apartenas preskaŭ nur al la spirita aktivosfero. Se estas tiel, mi proponas serĉi la bremsantajn faktorojn unuavice en tiu sfero: en la psiko de la individuoj, en la sociaj mekanismoj de la movado, en la esperanta kulturo (vastasence). Por prezenti kelkajn miaopinie tre efikohavajn - kaŭzojn de la stagnado, mi utiligos la koncepton de tondilo.

En la Esperanto-movado kreiĝis (laŭ mia konvinko) du tipoj de Esperanto-tondiloj, t.e. la hiato (disproporcio): a) inter la aspiroj kaj eblecoj (A-E) kaj inter la eblecoj kaj reala stato (E-R): La prezentita tondilo respondecas pri evoluo de la movado en la nuna etapo. Kio konsistigas la tondilon A-E? La neadekvateco de la aspiroj kaj eblecoj kaj la nesufiĉa distingo de tiuj du aferoj. La aspiroj de la esperantismo, pumpitaj en la mensojn de ties portantoj, estas bone konataj - la instalo de Esperanto kiel la ĉefa, fundamenta lingvo en la praktiko de la internaciaj perlingvaj kontaktoj. Samtempe niaj eblecoj kaj - miaopinie - la sole imageblaj taskoj atingas la unuan sojlon. Mi eĉ ne certas, ĉu la eblecoj por hodiaŭ estas tiel grandaj. Sed

ni premisu, ke jes. La tondilo A-E estas sentata mondscale. Ties efiko estas la ĉiam pli konsciata krizo de la celoj kaj identeco en la Esperanto-movado. La aspiroj diferencas de la eĉ plej optimisme konsiderataj eblecoj draste. Por konsciiĝi pri tio la movado bezonis 50 jarojn da stagnado. La progreso, kiun certaj vidas, estiĝus regreso, se ni konsiderus kiom rapide evoluas hodiaŭ la mondo de la internaciaj kontaktoj.

La akceptitaj kaj tradicie heredataj celoj de la Esperanto-movado kreskis je aspiroj, ĉar devis tiel antaŭ 80 jaroj. Post la kolektitaj spertoj, komence de la 80aj jaroj, ili devas esti kontestitaj. La celoj devas lokiĝi en la limoj de la eblecoj. La aspiroj povas nur ludi kiel lumturo, donante persistemon en la streboj. Kiu aktivulo tion ne komprenis, perdiĝis en fiasko. Kiu akceptis tiun starpunkton, povis kalkuli je sukcesoj.

Hodiaŭ ni serĉas nian identecon. Ni scias, ke malgraŭ la antaŭaj aspiroj ni ne savos la mondon tiel rapide. Dume ni ekzistas, ni formas propran socion kaj kulturon. Kaj en ĝi ni deziras havi la spirititan apogon, ĉerpi el ĝi kaj kunkrei ĝin. Kiel iu komunumo kun la trajtoj de etnogrupo. Ni konsideras tion nia rajto. Prave. Sed ni ne rimarkis ĝis nun, ke neniu dubas tion, nur ni mem... Daŭrigo sekvas.

Verkita en decembro 1980. Publikigita en *Pola Esperantisto* 3-4/1981.

Retajpita de Andreas Künzli kaj republikigita sur [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)